fonto: La Esperanta Budhano , N-ro 3-4 (2004-2005)

noto de la redaktoro:
1. La aŭtoro Ken ASSANO [Asano Kenŝin] naskiĝis en 1897, studis sociologion en la univ. Nihon kaj en la univ. Sorbono. Li estis direktoro de Tutjapana Ligo de Budhanaj Junuloj, kaj ludis la rolon de Budhisma delegito ĉe Tajlando en 1937, sed mortis juna, 42-jaraĝa, en 1939. Li mem esperantigis sian artikolon "La Fundamenta Koncepto de Budaisma Sociologio" el sia ĉefverko "Studo pri Budaisma Sociologio". Ĉi-suba artikolo estas el la broŝuro eldonita de Japana Esperanto-Instituo en 1935.
2. Konsiderante la historian karakteron de la teksto, la redaktoro lasas la arkaisman formon "budaismo".
3. Tiu ĉi artikolo enhavas kelkajn tekstojn en la angla kaj la franca. La redaktoro intermetis la tradukojn en Esperanto, kiuj estas montritaj en la krampo [ ]. La franclingvajn tekstojn s-ro Christian Lavarenne bonvolis traduki Esperanten.

# La Fundamenta Koncepto de Budaisma Sociologio

Ken ASSANO

## Ĉapitro I . *Starigo de Budaisma Sociologio*

En la printempo de la jaro 1929-a, kiam ni studadis en Eŭropo, en Sorbona Universitato en Parizo oni okazigis la inaŭguran kunsidon de la Instituto Franca-Japana por Studo de Budaismo sub la prezido de prof. Sylvain Lévi, mondofama hindologo, kiu vizitis Japanujon antaŭ jaroj, per antaŭpreparo de s-ro S. Muto kaj aliaj.

En tiu tago ankaŭ mi ĉeestis en la kunsido. La plimulto de tiamaj japanaj ĉeestantoj estis ĉirkaŭ dek studantoj, kiuj tiam loĝis kaj studadis en Parizo (inter ili mi memoras s-rojn Masataka Fuĵioka, Kaoru Ôtani, Kan'ei Okamoto, Tacuŝo Juge kaj aliaj). S-ro Entai Tomomacu venis Parizon por la kunsido el Hajdelbergo, la universitata urbo de suda Germanujo.

De la flanko de francoj partoprenis, krom jam menciita prof. Sylvain Lévi, prof. Paul Pelliot kaj aliaj unuaklasaj orientologoj kaj ili konsiliĝis por fondi la novan instituton.

Ĉu vi demandas, legantoj, - Kiel rilatas la priskribo al la temo? - Sed momenton atendu.

Pri la problemo, ĉar mi volis mencii ĉi tie, ke en la reguloj de ĉi tiu instituto - dum kies verkado ĉefe laboris prof. Lévi kaj s-ro Odin, ankaŭ mi mem aktive kunlaboris, - sintrovis unu paragrafo "La Sociologia Studo de Budaismo." Ĉi tiu paragrafo estis proponita de mi mem, kaj tuj akceptita. Vere tiu "sociologia studo de Budaismo" estis aprobita ĝenerale de sciencistoj en Eŭropo kaj Ameriko, - precipe inter francaj sciencistoj, ĝi estis aprobita sen ia dubo, kontraŭe kun forta fervoreco. Ĉar plimulto de francaj orientologoj estas sociologoj kaj estas fakto, ke almenaŭ ili ricevis multan influon de Durkheim-skolo.

Kiel mi skribis supre, ĉi tiu paragrafo la "sociologia studo de Budaismo" insiste proponita de ni estas aprobita de la kunlaborinto s-ro Odin, kaj prof. Lévi ankaŭ rimarkis ĝian gravecon.

Tiam mi skribis en mia informo "El Parizo" sendita al la ĵurnalo *Ĉûgai-nippô* kaj ankaŭ en la traktato sendita al la gazeto "Sociologia Revuo", la progreson de la religia sociologio en Francujo, kaj precipe menciis pri katolika sociologio, kiu stariĝis en la lastaj jaroj. Kaj mi menciis ankaŭ, ke en la unika plej alta studejo Kolegio de Francujo jam ekzistas la lekcio de Sociologio kaj Sociografio Mahometanismaj, kiun lekciis prof. Louis Massignon. Plie mi konfesis, ke en Japanujo ankaŭ la klopodo de la studantoj devas esti direktata al la starigo de la Budaisma Sociologio, ĉar en nia lando Budaismaj fenomenoj sin prezentas sur sociaj faktoj.

Efektive la Katolika Instituto de Parizo jam malfermis sociologian fakon, kaj oni vigle studadas katolikan sociologion. Tie grupiĝantaj sociologoj katolikaj vigle laboradas kontraŭ la sociologisma Durkheim-skolo kritikante ĝin por konstrui propran sistemon en paroladoj kaj en verkado, kaj kompreneble jam estas publikigitaj kelkaj libroj kun titolo "Katolika Sociologio."[1]

Sed tamen ĝis hodiaŭ en Japanujo, kiu estas la lando de la plej aktive laborantaj budaanoj, Budaisma Sociologio ankoraŭ ne estis proponita. Pro kio la fakto povas esti? Plie Japanujo estas unika laŭ la multeco de lernejoj dependaj de budaanaro, la nombro de universitatoj kaj kolegioj budaismaj kalkuliĝas pli ol dek, sed ni ne konas eĉ unu, en kiu oni havas regulan lekcion de Budaisma Sociologio. Laŭeble kaj malofte nur estas legataj la verkoj de Durkheim kaj Weber, k.t.p., eĉ tio estas limigita, pro lingva malfacileco nur inter malmultaj studentoj en budaismaj universitatoj. Tute senbezone diri, ke oni lasis ĝin ne tuŝinte kiel virgan arbaron, lerninte tiun metodologion de ĝenerala religia sociologio kaj aplikante ĝin por studo de Budaismo.

Kial oni ne donas lekcion de Budaisma Sociologio, kiu estas pli grava kaj pli utila speciala scienco ol tiu de ĝenerala sociologio en universitatoj de budaismaj sektoj? Se tio estas kaŭzita nur pro manko de kompetentuloj, oni povas disponi junajn studantojn al ĝi. En ĉia ajn kondiĉo ni atendas la tagon, en kiu nia ĉi propono estos realigata. Ne nur por tio, ni volas klopodadi por starigo de ĉi tiu fekunda nova fako de sciencoj, Budaisma Sociologio, kun sincera kritiko kaj konsento de kleruloj en la mondo.

Starigo de la nova lekcio de Budaisma Sociologio ne estas tiel facile realigata, ĉar oni renkontos kontraŭdiron, ke tia ne ekzistas eĉ en Eŭropo. Sed ĝi ne povas esti preteksto por ke en Japanujo oni ne malfermu la lekcion, kiu ne sin trovas en Eŭropo. Aŭ tia kontraŭdiro povus esti ne prezentata jam en nuna Japanujo. Kvankam tian sensencan oni ĝis nun devis renkonti ofte en estinteco en japana sfero de edukistoj, kie regis senkritika imitado. Ankaŭ en ĉiu universitato privata aŭ sekta same regis imitado senkritika kaj senoriginala. Sed nun male ni devas esti tiel kuraĝaj, ke ni progresigu la studon kaj starigu specialan sciencon en japanaj universitatoj, precipe en tiuj apartenantaj al budaismaj sektoj, kies ekzisto estas originala kaj speciala nur en Japanujo, kaj prezenti ĝin al eŭropa sciencistaro, ĉar ĝi ne ekzistas en eŭropaj universitatoj. Plie tia kultura tasko jam estis destinita sur la ŝultroj de japanaj budaanoj kaj budaismaj studejoj. Ankaŭ oni povus prave diri ke efektive tia internacia partoprenado devas esti nun farata de japanaj sciencistoj kaj tion atendas internacia sciencista rondo.

Kvankam mi ne intencas prediki aŭ naciismon aŭ tut-azianismon, sed mi rekomendas Japanujon kiel la patrujon de ĉi tiu nova scienco, ĉar vere nur en Japanujo, en Orienta Azio, sin trovas multaj eblecoj historie kaj geografie por studado de Budaisma Sociologio.

Kiel en kristanisma socio naskiĝis Kristanisma Sociologio, kaj precipe en Francujo, katolika lando, estis progresigita Katolika Sociologio, ankaŭ kiel en Anglujo, kiu regas Hindujon, progresis Hindologio, kaj kiel en Francujo, kiu posedas grandan kolonion en Afriko loĝata de multaj mahometanoj, estas studata Mahometanisma Sociologio, tiel same en Oriento, precipe en Japanujo, la budaana lando, la studo de Budaisma Sociologio estas starigata kaj progresas, kaj tio estas tute natura afero, kaj ĝi estas nepra rezultato de homa kulturo, kaj ĝi

---

[1] Kiel ekzemple:

L'Abbé Naudet: *Premiers principes de sociologie catholique*, 2e éd. Paris, 1901.

R.P.A.Belliot (O.F.M.): *Manuel de sociologie catholique. Histoire-Théorie-Pratique*, Paris, Lethielleux, 1910.

Georges Legrand: *Les grands courants de la sociologie catholique à l'heure présente*, Paris, Editions Spes, 1927.

Plie sur la vidpunkto de sociologio katolika estis kompilita kaj eldonita la vortaro ĉi-suba:

*Dictionnaire de sociologie, familiale, politique, économique, générale*, par l'abbé Thomas Mainage (Prof. à l'Institut catholique de Paris), 2 vol. Paris, Lib. Létonzet et Ané.

devas esti unu granda kontribuo de japana sciencistaro al internacia kulturo.

Ĉu vere, en nuna tago, la lando, en kiu Budaismo daŭrigas sian vivon kaj funkcias plej forte, sendube estas Japanujo, "la lando plej taŭga por Mahajano" de Ekstrema Oriento? Oni diras ke en la nasklando, Hindujo, Budaismo nun vivas ne tiel vigle, kontraŭe floras nur la unua Bramanismo, kiun nomis budaanoj hereza, la dua Kristanismo nove enportita. Ankaŭ en Ĉinujo Budaismo nun estas kvazaŭ kastrita kaj fariĝis brokantaĵo?

Tiel observante, se oni serĉas iun landon, kiu havas taŭgan pozicion, kaj kiu povas iom ajn gvidi universalan budaisman movadon, (neparolante pri la kompetenteco,) ŝajnas al ni, neniu lando troviĝas krom Japanujo, ĉar japana asocio estas multe pli budaisma socio, kaj tie estas sufiĉe preta budaisma grundo, kiel mi supre priskribis.

Estus insisto ne troa, se mi diras, ke Budaisma Sociologio , kiun ni volas studi kiel unu novan sciencon, havas sorton, ke ĝi kresku en tiu tero, t.e. japana socio plimulte budaismeca, ĉar ĝi posedas plimulte da budaismaj faktoj.

La plia problemo kuŝas en studmaniero. Ĉi tiu studmetodo de eŭropaj sciencistoj ŝajnas al tiuj, kies kapo kutimiĝis kun dogmoj instrui ĉion en du kategorioj, aŭ ortodoksa aŭ hereza, ke ĝi estas konsterniga, nekomprenebla, blasfema, kontraŭ digno de Budaismo. Ankaŭ troviĝas iuj, kiuj, kvankam iom komprenantaj, nekomprenas internan esencon, aŭ kortuŝite de io negrava, imitas mallerte; tio estas ridinda.

Tiamaniere ni estas kondukataj de nur malmultaj eŭropaj sciencistoj. Preninte ilian bonan metodon, longe resti en tia stato estas por ni granda bedaŭro. Eble en Japanujo, kvankam kie sintrovas tre abunde budaismaj fenomenoj kiel sociaj faktoj, mankis metodo, per kiu oni efike kaj sufiĉe trakti ilin en la lumo de moderna scienco, alivorte por ĝi estas preta la materialo sed mankas la maŝino por utiligi ilin. Tial ĉe nia flanko antaŭ ĉio ni devas prepari la maŝinon kaj plibonigi ĝin kaj lerni ĝian uzadon. Ekpaŝo de ĉiu scienca studo devas esti ellerno de metodo. Kaj por ni tiu ĝisnuna spekulativa aŭ metafizika metodo jam ne taŭgas sufiĉe. Nia metodo devas esti pli pozitiva. Ĝi devas esti metodo de Budaisma Sociologio kiel unu nova scienco.

Tiamaniere komenciĝas la konstrua laboro de Budaisma Sociologio. Kaj tio ja estas al ni donata fundamenta problemo.

## Ĉapitro II . *Kio estas Budaisma Sociologio?*

Kvankam la termino "Budaisma Sociologio" sonas eble tro nova al oreloj, kiuj aŭdas ĝin la unuan fojon, tamen mi opinias, ke ĉiuj legantoj jam komprenis, ke ĝi tute ne estas nomo en vulgara scienco.

Sekve, ĉi tie ni devas trakti la fundamentan problemon, "Kio estas Budaisma Sociologio?" Nome oni devas provi difini la ĝeneralan koncepton de "Budaisma Sociologio."

Kio estas Budaisma Sociologio? - ĉi tiu demando estas alfao kaj omego de ĉi tiu scienco, kiu nun estas antaŭ ni prezentata. En ĉiu scienco oni devas doni al ĝi la difinon ne ĉe la komenco de la studo, sed ĉe la fino kiel konkludon. Kaj plie de tio multe da diskutoj devas esti disvolvataj. La difino de scienco ĝenerale en la procedo scienca devas esti la paŝo ne la unua, sed la lasta. Resume, vorto, frazo kaj koncepto k.c. iom post iom estas difinitaj kaj pli kaj pli estas rafinitaj laŭ la progreso de la procedo en la studo, sed ĝi ne devas esti alte tenata en la komenco kiel standardo. Ankaŭ ni devas bone memori ke nuntempe jam oni ne devas altrudi sian dogmon kaj arbitron rilate al la decido de la difinoj.

Kvankam laŭ la supra argumentado ni devas respondi al tiu demando nur tiam, kiam ni finis iel ajn la studon, tamen por antaŭenpuŝo de la studo ni havas iun difinitan antaŭvidon, perspektivon, sen kiu ni ne povas antaŭeniri eĉ unu paŝon, kaj kiu sola devas esti la kompaso por nia laborado.

Tial tiu direktado jam sugestas la ĝeneralan strukturon de la scienco; ne, se mi povus, mi volas diri, ke per la direktado oni devas disvolvi la sciencan sistemon. Nu, en tia senco mi provas starigi ĝeneralan koncepton de ĉi tiu plej juna scienco, "Budaisma Sociologio."

### 1. Budaisma Sociologio kiel speciala sociologio

Budaisma Sociologio kompreneble ne nur estas unu speciala sociologio(2), sed aliflanke ĝi estas nova grava speciala fako de Budaismaj sciencoj. Sed nun ni ekzamenas Budaisman Sociologion de la vidpunkto metodologia, kaj ni traktas socilogie Budaismon (pli precize, la socialajn fenomenojn budaismajn) kiel studobjekton.

Budaisma sociologio unuvorte estas sociologia studo de budaismo. En tiu kazo Budaismo, pli precize, signifas la socialajn fenomenojn budaismajn. Pri tiu objekto de la studo ni poste detale priskribos.

Antaŭ ĉio ni nepre devas ekzameni pri la sociologio mem, ĉar ni celas sociologian studon. Origine la termino "sociologio (*sociologie*)," kiel jam konate, estis kreita de Auguste Comte (1798-1857). Tio estis ĉirkaŭ la 1830-a jaro(3). Poste la sociologio faris neordinaran disvolvon, kaj nun jam unu jarcenton poste ĝi ne nur akiris civitanan rajton en scienco, sed ankau ĝi donadas multajn influojn al diversaj aliaj sciencoj.

Do, kia scienco estas la sociologio? Kian difinon ĝi havas en sia nuna progresinta stato? Ekzemple Sorokin skribas:

"Following the classification by H. Rickert and W. Windelband of sciences into those that are *individualizing* and those that are *generalizing* we regard sociology as a *generalizing* discipline among other social disciplines."(4)

---

(2) Tiel nomataj "Specialaj sociologioj" kredeble devenas de la specialigo de sociologio laŭ la propono de Durkheim-skolo. Nome en la 2-a volumo de "L'*Année sociologique*," 1898, ili publikigis 6 specialajn sociologiojn: religia sociologio, morala sociologio, jura sociologio, ekonomia sociologio, lingva sociologio kaj estetika sociologio. Kaj aparte la terminoj: familia sociologio, politika sociologio k.c. estas uzataj. Plie laŭ la progreso de la sociologio mem specialaj sociologioj pli kaj pli disfakiĝis, kaj nun ni vidas antaŭ ni tre multe da specialaj sociologioj.

[noto de la redaktoro: La aŭtoro sube listigas multajn ekzemplojn de "specialaj sociologioj". Sed la redaktoro ellasis ilin, ĉar ili probable ne tre interesas legantojn.]

(3) V. Comte, *Cours de philosopie positive*, t. IV, 1839, p.201

(4) Sorokin and Zimmerman, *Principles of Rural-Urban Sociology*, N.Y. 1929. p.3

["Laŭ la klasifikado fare de H. Rickert kaj W. Windelband pri sciencoj en tiujn *individuigajn* kaj *ĝeneraligajn*, ni rigardas sociologion kiel *ĝeneraligan* faksciencon inter aliaj sociaj faksciencoj."]

Tiamaniere la sociologio estas difinita kiel la ĝeneraligita scienco, sub la influo de klasifikado de sciencoj de Novkantanisma skolo germana. Plie la sociologio, kiu tiel staras sur la bazo de ĝeneraligita scienco, nun estas, laŭ Sorokin, resumebla kiel jene:

"It (Sociology) seems to be a study, first, of the *relationship and correlations between various classes of social phenomena, (correlations between economic and religious; family and moral; juridical and economic; mobility and political phenomena and so on); second, that between the social and the non-social (geographic, biological, etc.,) phenomena; third, the study of the general characteristics common to all classes of social phenomena.*"(5)

["Ĝi (Sociologio) ŝajnas esti studo, unue, de la *parenceco kaj korelacioj inter diversaj klasoj de sociaj fenomenoj (korelacioj inter ekonomiaj kaj religiaj sociaj fenomenoj; familio kaj moralo; juraj kaj ekonomiaj sociaj fenomenoj; moveco kaj politikaj fenomenoj, k.t.p.); due, tiuj inter la sociaj kaj ne-sociaj (geografiaj, biologiaj k.t.p.); trie, la studo de la ĝeneralaj karakterizaĵoj komunaj al ĉiuj klasoj de sociaj fenomenoj.*"]

Sub tia stato de sociologia studo Budaisma Sociologio kiel unu speciala fako de sociologio, kiu intencas studi diversajn socialajn fenomenojn budaismajn, estas eklaborata kun nepre necesa postulo.

## 2. Budaisma Sociologio kiel speciala fako de Religia Sociologio

Budaisma Sociologio estas speciala sociologio; ĝi traktas budaismajn fenomenojn kiel religiajn fenomenojn. Sekve ĝi estas unu fako de religia sociologio, kiu traktas ĝeneralajn fenomenojn de religioj. Tial ĝi estas unu speciala fako de religia sociologio, kaj la lasta (religia sociologio) mem ankaŭ estas unu speciala fako de sociologio ĝenerala.

De la komenco religia sociologio estis kreita kaj starigita de la nuntempa franca sociologo Emile Durkheim (1858-1917). Prof. Gaston Richard, nuna profesoro de Bordoa Universitato, pri tio skribas:

"Le terme de sociologie religieuse a été créé par l'*Année sociologique* que dirigeait Emile Durkheim. Il n'apparaît pas avant 1898; il désigne alors une des six sections de cette publication, destinée à rendre compte du mouvement des recherches sociologiques et plus encore à étudier objectivement les sources de la nouvelle science. (C'est ainsi que Durkheim l'avait présentée à plusieurs de ses collaborateurs dont je fus pendant quelques années...) Mais il apparut bientôt que la sociologie religieuse était la branche maîtresse de l'*Année sociologique*, qu'elle s'inspirait d'une doctrine définie sur la nature, l'origine et l'évolution de la religion, et que cette doctrine dépassait de beaucoup la compétence d'une science spéciale des sociétés. Une série de mémoires dûs les uns à Durkheim, les autres à MM. Mauss et Hubert, préparèrent et annoncèrent l'œuvre qui devait résumer la doctrine. Cette œuvre, les *Formes élémentaires de la vie religieuse*, parut enfin en 1912."(6)

("La termino "(pri)religia sociologio" estas kreita de *L'Année sociologique*, kiun direktis Emile Durkheim. Ĝi ne aperis antaŭ 1898 ; ĝi tiam estis la nomo de unu el la ses fakoj de tiu revuo celanta raporti pri la movado de la sociologiaj esploroj kaj, ankoraŭ pli, objektive pristudi la fontojn de la nova scienco. (Tiel Durkheim prezentis ĝin al pluraj el siaj kunlaborantoj, inter kiuj mi estis dum kelkaj jaroj…) Sed baldaŭ montriĝis ke la religia sociologio estis la ĉefbranĉo de *L'Année sociologique*, ke ĝi inspiriĝis de difinita doktrino pri la naturo, la origino kaj la evoluo de religio, kaj ke tiu doktrino multe transpasis la (sferon de) kompetenteco(n) de speciala scienco pri socioj. Serio de memuaroj, iuj de Durkheim, aliaj de s-roj Mauss kaj Hubert, preparis kaj anoncis la verkon kiu estis

---

(5) Sorokin (Pitirim), *Contemporary Sociological Theories*, N.Y. and London, 1928, p.760

(6) Gaston Richard, *L'athéisme dogmatique dans la sociologie religieuse*, (*Cahiers de la Revue d'histoire et de philosophie religieuses*, No.7), Strasbourg et Paris, 1923, p.4-5.

resumonta la doktrinon. Tiu ĉi verko, *Les Formes élémentaires de la vie religieuse*, finfine aperis en 1912.")

La termino "Religia Sociologio" la unuan fojon ŝajne estis uzita en 1898, kaj la verkego en tiu fako "La formoj elementaj de la vivo religia" estis publikigitaj dekkvin jarojn poste en 1912. Tiu fakto sufiĉas montri, kiel li penadis por ĝin verki. Kiel mi menciis, en 1898 Durkheim publikigis la terminon religian sociologion kiel unu specialan fakon. Tio estis en la antaŭparolo de la dua volumo de l'*Année sociologique* [temas pri titolo de ĉiujara revuo pri sociologio ("La sociologia jaro")], kie estis prezentitaj ses fakoj; religia sociologio, morala sociologio, jura sociologio, ekonomia sociologio, lingva sociologio, estetika sociologio; kaj aparte "Morfologio Sociala" estis metita. Tio estis pli klare montrita en lia artikolo *Sociologie et Sciences Sociales* [Sociologio kaj (pri)socialaj sciencoj (ankaŭ titolo de revuo aŭ de libro)] en *De la Méthode dans les Sciences* [Pri metodo en sciencoj], la kolektivaj artikoloj, eldonita en 1910, kiu preskaŭ difinis la sistemon de la sociologio de Durkheim-skolo, tie la ses fakoj estis prezentitaj kiel ses subdividoj de "Fiziologio Sociala" kiel jene:

I. Morfologio Sociala
II. Fiziologio Sociala
1.Sociologio Religia
2.Sociologio Morala
3.Sociologio Jura
4.Sociologio Ekonomia
5.Sociologio Lingva
6.Sociologio Estetika
III. Sociologio Ĝenerala

Ankoraŭ plie familia sociologio, politika sociologio, aperis en la boraĵoj de Durkheim-skolo. Kaj la ĵus dirita sistemo estas akceptata de sciencistoj de tiu skolo, kaj jam nun ĝi sin trovas eĉ en lecionoj de francaj mezlernejoj.

Kaj en serio da laboraĵoj koncerne al religia sociologio, kiu okupis la ĉefan lokon en la studo de Durkheim-skolo, troviĝas aparte eldonitaj libroj: verkoj de Durkheim: "La formoj elementaj de religia vivo" 1912, kiun mi jam nenciis, de Hubert kaj Mauss: *Mélanges d'histoire des religions* [Kompilaĵoj pri historio de religioj], 1909, de R. Hertz: *Mélanges de sociologie religieuse et de folklore* [Kompilaĵoj pri religia sociologio kaj folkloro], 1928, de M.Bouglé: *Essais sur le régime des castes* [Eseo pri la reĝimo de la kastoj], 1908, kaj *Le√ons de sociologie sur l'évolution des valeurs* [Lekcioj de sociologio pri la evoluo de la valoroj], 1928, kaj de Lévy-Bruhl kaj aliaj.(7)

Supre ni jam trarigardis situon de religia sociologio en la kampo de ĝenerala sociologio, kaj nun ni plie rigardu tiun de Budaisma Sociologio inter la subdividoj de religia sociologio. Dividante religian sociologion en fakojn, oni akiras jenan tabelon:

I. Kristana Sociologio
a) Katolika Sociologio
b) Protestanta Sociologio
II. Mahometana Sociologio
III. Budaisma Sociologio
IV. Ŝintoisma Sociologio kaj aliaj.

Inter ili pri Kristana Sociologio, precipe pri Katolika Sociologio kaj pri Mahometana Sociologio, kiel mi jam iom menciis, en Eŭropa kaj Amerika sciencistaro sin trovas imponaj lekcioj kaj sufiĉe bonaj libroj. Estus senbezone mencii, ke precipe abundas verkoj koncerne al Kristana Sociologio.(8)

---

(7) Profitante la okazon mi nomu kelkajn verkojn pri religia sociologio:

a) En Francujo, Maunier: *Vie religieuse et vie économique*; Henri Beuchat kaj M. Hollebecque: *Les religions. Etude historique et sociologique du phénomène religieux*, Paras, Rivière, 1910; Raoul de la Grasserie: *Des religion comparées au point de vue sociologique*, Paris, 1899; M. Guyau: *L'Irréligion de L'Avenir. Etude sociologique*; k.t.p.

b) En Germanujo, Simmel, *Die Religion*; E. Trœltsch, *Gesammelte Schriften*, precipe, *II. Hinduismus und Buddhismus*, Tπbingen, 1921; J. Wach, *Einfπhrung in die Religions-soziologie*, 1931 kaj aliaj.

(8) Kelkaj verkoj pri Kristana Sociologio ĝenerala:

Penty (A.J.), *Towards a Christian Sociology*; Wallis (Louis), *Sociological Study of the Bible*, 1912; Hill (Chatherton), *Sociological Value of Christianity*, 1912; Hudson (Canon C.D.), *Preface to Christian Sociology*, London, 1935.

Kaj mi jam menciis verkojn pri Katolika Sociologio, kaj do nomu unu verkon pri Protestanta Sociologio:

Hauter (Ch.), *Le Probléme sociologique du Protestantisme (Cahiers de la Revue d'histoire et de Philosophie religieuse*, No. 5.)

Sed tamen oni devas krii: En kia mizera stato sin trovas Budaisma Sociologio, kiu ja devas esti grava speciala fako de religia sociologio! Kompreneble ĝis nun ne mankis emfazo pri la neceseco de la sociologia studo de Budaismo, kaj iuj eĉ provis studi ĝin.

Kvankam sin trovas abunde da materialoj kaj fragmentoj de sociologiaj studoj pri Budaismo, sed ĝis nun ne estis provita la sistema sinteza studo. Estus senbezone mencii pri la manko de ĝia lekcio aŭ verko ĝenerala. Ne estis prezentita ĝia decida pretendo aŭ sistemo, kvankam ĝiaj ĝermoj multe vidiĝis. Sed tamen, ĉu nun ĉiuj ĉi tiuj ne dependas de nia penado? Kaj almenaŭ la krono de la hejmlando de Budaisma Sociologio nature estos gajnata de azianoj.

# Ĉapitro III . *La Objekto kaj Metodo de Budaisma Sociologio*

## 1. La Objekto de Budaisma Sociologio

La objekto de Budaisma Sociologio estas budaismaj fenomenoj kiel religiaj fenomenoj, pli precize, budaismaj sociaj fenomenoj, nome familiaj, politikaj, juraj, moralaj, ekonomiaj, artaj fenomenoj ktp. Kaj samtempe krom ili aparte povas esti starigata Morfologio Budaisma, en kiu oni studas ekleziajn, ritajn fenomenojn kc. en Budaismo kiel objektojn.

Kaj en tia studo estos oportune komenci per ekzameno pri ĝenerala koncepto de religio. Oni povas mencii multon da konceptoj de religio sed ni unue ekzamenu Durkheiman teorion kaj disvolvu nian traktadon, ĉar ĝi havas plej gravan influon sur internacian sciencistaron.

Tio estas ke Durkheim atingis en sia fama verko *La formoj elementaj de la vivo religia* jenan tezon:

"*Une religion est un système solidaire de croyances et de pratiques relatives à des choses sacrées, c'est-à-dire séparées, interdites, croyances et pratiques qui unissent, en une méme communauté morale, appelée Eglise, tous ceux qui y adhèrent.*"(9)

["*Religio estas interdependa sistemo de kredoj kaj praktikoj rilataj al aĵoj sakralaj, tio estas apartigitaj, malpermesitaj, kiuj kredoj kaj praktikoj unuigas, en unu saman moralan komunumon, nomitan Eklezio, ĉiujn kiuj aliĝas al ĝi.*"]

Ĉi tio estas la difino de religio cerbumita de Durkheima skolo, nome, sociologiisma skolo. Senbezone estus diri kiel ĝi multe diferencas de la teorio pri religio metafizika, spekulativa. Dum ĝisnunaj prireligiaj teorioj, kiuj rigardis religion plimulte kiel fenomenon individuan psikologian, Durkheima teorio havas sufiĉan bazon socian kaj pozitivan. La teorio de "Sento de absoluta dependeco" de Schleiermacher kaj aliaj estas tiel individuisma kaj kristanisme partiema, ke ĝi jam estis tute likvidita. Ĉe budaisma ideo, kiu staras sur speciala ateismo, tia kristanisma ideo tute ne taŭgas por klarigi. Precipe ĉe Zen aŭ ĝano ni tion sentas pli profunde. Pro tio ŝajnas al ni ke eŭropanoj kaj amerikanoj sentas pli fortan intereson al ĝano.

Ni revenu al la temo. Science akiri religion kiel socian fenomenon estas religia sociologio, sekve scienca akiro de Budaismo kiel socia fenomeno estas Budaisma Sociologio, alivorte, la religiaj fenomenoj budaismaj kiel sociaj fenomenoj estas la studobjekto de Budaisma Sociologio.

Morfologio Budaisma, oni povas diri, traktas kiel studobjekton solidaran sistemon de tiuj ideoj kaj agoj koncernantaj al sanktaj aferoj en Budaismo, t.e. izolitaj kaj sanktigitaj ideoj kaj aferoj, kiuj unuigas en saman moralan komunan socion nomatan Budaisma eklezio ĝiajn ĉiujn kredantojn.

Ĉi tie ni nur tuŝu la koncepton pri religio de la flanko de la historia materialismo. Ĝi estas tiu de Lukaĉevskij, kiu donis ordon al Marksismaj teorioj pri religio kaj ekzamenis Durkheiman teorion pri religio kaj fine atingis jenan sintezitan difinon de religio:

"Religio estas ideologio, kiu estas pli-malpli ordigita sistemo konsistanta el ideo animista kaj al ĝi alkroĉitaj emocioj kaj agoj. En iu evolustadio de socio moralo estas aldonata al ĝi." (10)

Kvankam ĉi tiu difino de religio laŭ sia formo havas postesignon de la fakto ke ĝi estis ordigita laŭ Durkheima pensmaniero, atentinda punkto estas tio, ke antaŭe Durkheim starigis "ateismeman" teorion studante Budaismon, nun Lukaĉevskij, utiliginte la rezulton de studo de Pleĥanov ke Budaismo (precipe nuntempa) ankaŭ estas sistemo de animismaj ideoj same kiel ĉiuj aliaj religioj, starigis supre menciitan teorion novan. Ĉu estus multe konsiderinda la punkto, ke Durkheim kaj Lukaĉevskij korektis koncepton pri religio konsiderante Budaismon nur tre malmultgrade? Kompreneble jes, kaj plie ni havas devon kaj rejton prezenti laborfrukton, kiu postulas pli da tia korekto.

---

(9) *Les formes èlèmenntaires de la vie religieuse*, p.65

(10) Lukaĉevskij: *Origino kaj Esenco de Religio*, japana trad., p.15

## 2. La Metodo de Budaisma Sociologio

Budaisma Sociologio estas speciala fako de religia sociologio, kiu estas ankaŭ speciala fako de la sociologio. Ĉu ĉi tiu Budaisma Sociologio kiel speciala fako do devas havi apartan studon? Ne, ne necese. La tasko, kiun ĝi devas plenumi en sia propra kampo, povas esti tute sama kiel tiu de ĝenerala sociologio.

Ĉi tie mi diru la rilaton inter sociologio ĝenerala kaj Sociologio Budaisma. Se ĝenerala sociologio plene plenumis sian taskon, en Budaisma Sociologio, por *ekspliki* la socialajn faktojn, oni povos nur apliki formulojn kaŭzecan aŭ funkcian de ĝenerala sociologio en tiu difinita problemo. Sed malfeliĉe ĝenerala sociologio en siaj multaj regionoj ne havas normalan sintezon tute elprovitan. Tio povos esti atingebla nur post kolektiva disvolvo de la specialaj studoj. Sekve ankaŭ en Budaisma Sociologio kiel unu speciala fako ĝia studanto devas komenci la studon de la unua paŝo. Kaj li ankaŭ devas eltrovi tion, kio kaŭzas iujn difinitajn diferencojn, aŭ por trovi relativecon, kiu ankoraŭ ne estas provita en la ĝenerala sociologio, li devas labori aparte de la sociologio ĝenerala. Tial, se la nova relativeco estos pravigebla en Budaisma Sociologio, la eltrovinto, budaisma sociologo, solvos ne sole sian taskon sed ankaŭ tiun de ĝenerala sociologio. Tiamaniere ĝis nun ne provitaj kaj ankoraŭ neklaraj punktoj estos per klarigoj en specialaj fakoj inverse estos resumitaj kaj kunmetataj en la ĝeneralan sociologion.

Sed ni devas utiligi kuraĝe ĝis nun progresintajn teoriojn de sociologio, se ne ni neatendite perdos vane nian forton. Tial speciale en metodologio nepre necese estas ekzameni kaj utiligi ilin atente.

Ĝenerale scienca studo postulas almenaŭ: 1) ke en la studo apliku difinitan proceдон, 2) ke limigu studregionon, 3) ke estu objektiva, 4) ke flanken lasu ĝian aplikan flankon, ktp. Mi plie volas utiligi la normon, kiun donis Durkheim en sia *Metodo Sociologia*.

Tiel nomata la fundamenta principo metodologia en Durkheima sociologio staras en tio, ke devas esti traktataj socialaj faktoj tute egale kiel aliaj aferoj. Sed al ĉi tiu esprimo estas donita granda limigo. Tial ni vidu senpere lian propran klarigon:

"Nous ne disons pas, en effet, que les faits sociaux sont des choses matérielles, mais sont des choses au même titre que les choses matérielles, quoique d'une autre manière.

"Qu'est-ce en effet qu'une chose? La chose s'oppose à l'idée comme ce que l'on connaît du dedans. Est chose tout objet de connaissance qui n'est pas naturellement compénétrable à l'intelligence, tout ce dont nous ne pouvons nous faire une notion adéquate par un simple procédé d'analyse mentale, tout ce que l'esprit ne peut arriver à comprendre qu'à condition de sortir de lui-même, par voie d'observations et d'expérimentations, en passant propressivement des caractères les plus extérieurs et les plus immédiatement accessibles aux moins visibles et aux plus profonds. Traiter des faits d'un certain ordre comme des choses, ce n'est done pas les classer dans telle ou telle catégorie du réel; c'est observer vis-à-vis d'eux une certaine attitude mentale. C'est en aborder l'étude en prenant pour principe qu'on ignore absolument ce qu'ils sont, et que leurs propriétés caractéristiques, comme les causes inconnues dont elles dépendent, ne peuvent être découvertes par l'introspection même la plus attentive."[11]

["Ĉar ni ne diras ke la sociaj faktoj estas materiaĵoj, sed estas aĵoj samgrade kiel la materiaĵoj, kvankam alimaniere.

"Kio fakte estas aĵo ? Aĵo kontraŭas ideon kiel tion kion oni konas deinterne. Estas aĵo ĉiu kunobjekto kiu ne estas nature kunpenetrebla por la intelekto, ĉio pri kio ni ne povas fari al ni adekvatan nocion per nura procezo de mensa analizo, ĉio kion la spirito povos sukcesi kompreni nur kondiĉe ke ĝi eliros el si mem, per rimedo de observadoj kaj eksperimentoj, progresive pasante de la plej eksteraj kaj la plej senpere alireblaj karakteroj al la malplej videblaj kaj la plej profundaj. Do pritrakti iajn faktojn kiel aĵojn, tio ne estas enklasigi ilin en iun aŭ alian kategorion de la

[11] *Les Régles de la Méthode sociologique*, p. XI.

realo ; tio estas rilati al ili kun iu mensa sinteno. Tio estas entrepreni ilian studon prenante kiel principon ke oni tute ne scias kio ili estas, kaj ke iliaj karakterizaj ecoj, same kiel la nekonataj kaŭzoj de kiuj ili dependas, ne povas esti malkovrataj per la introspekto eĉ la plej atentema."]

Durkheim diras plu:

"Notre règle n'implique donc aucune conception mètaphysique, aucune spéculation sur le fond des êtres. Ce qu'elle réclame, c'est que le sociologue se mette dans l'état d'esprit où sont physiciens, chimistes, physiologistes, quand ils s'engagent dans une région, encore inexplorée, de leur domaine scientifique. Il faut qu'en pénétrant dans le monde social, il ait conscience qu'il pénètre dans l'inconnu; il faut qu'il se sente en présence de faits dont les lois sont aussi insoup√onnées que pouvaient l'être celles de la vie, quand la biologie n'était pas constituée; il faut qu'il se tienne prêt à faire des découvertes qui le surprendront et le déconcerteront."[12]

["Do nia regulo implicas nenian metafizikan konceptadon, nenian spekulativadon pri la fundo de la estaĵoj. Kion ĝi postulas, tio estas ke la sociologo metu sin en la spiritan staton en kiu estas fizikistoj, kemiistoj, fiziologoj kiam ili eniras regionon, ankoraŭ neesploritan, de sia scienca kampo. Penetrante en la socian mondon, li devas konscii penetri en la nekonatan; li devas senti sin en ĉeesto de faktoj kies leĝoj estas same tute nekonataj kiel estis tiuj de la vivo kiam biologio ankoraŭ ne ekzistis; li devas teni sin preta fari malkovrojn kiuj lin surprizos kaj konsternos."]

Tia fundamenta normo elkondukas tri duagradajn leĝojn:

I. "*Il faut écarter systématiquement toutes les prénotions.*"[13]

[I. "*Devas esti sisteme forigitaj ĉiuj antaŭnocioj.*"]

II. "*Ne jamais prendre pour objet de recherches qu'un groupe de phénomènes préalablement définis par certains caractères extérieurs qui leur sont communs et comprendre dans la même recherche tous ceux qui répondent à cette définition.*"[14]

[II. "*Devas esti prenita kiel esplorobjekto nur grupo de fenomenoj antaŭe difinitaj per iuj eksteraj karakteroj kiuj estas komunaj al ili, kaj esti kunprenitaj en la saman esploradon ĉiuj kiuj respondas al tiu difino.*"]

III. "*Quand le sociologue entreprend d'explorer un ordre quelconque de faits sociaux, il doit s'efforcer de les considérer par un côté où ils se présentent isolés de leurs manifestations individuelles.*"[15]

[III. "*Kiam la sociologo entreprenas esplori iajn ajn sociajn faktojn, li devas strebi konsideri ilin per flanko laŭ kiu ili prezentiĝas izolitaj disde siaj individuaj manifestiĝoj.*"]

Ĉi tiu metodo sociologiisma de Durkheim-skolo devas esti multe konsiderata kiel metodo de nia Budaisma Sociologio.

Ankaŭ multe atentinda estas la metodo de tiu "historia materialismo" (kiun nomis Buĥarin "Sociologio Marksisma".) Kompreneble ni devas eviti formulisman materialismon, sed studo en ĉi tiu flanko ankaŭ devas esti atentata, ĉar estas nerefutebla fakto, ke eĉ budaisma fenomeno progresis en relativeco kun sia socia ekonomia bazo. Nome la kritiko de ideo de antikvaj hindoj laŭ materialisma dialektiko farita de Thalheimer ankoraŭ nur estas tre fragmenta, sed ĝi estas la unua en tiu direkto.[16]

Krom tio *Apero de religio kaj kredo je dio* de Kunow, kaj *Origino kaj esenco de religio* de Lukaĉevskij estas valoraj verkoj en ĉi tiu kampo. Ankaŭ valora estas "Azia maniero por produkto", kiu lastatempe estis farita en Sovetio. Ankaŭ atentinda estas la aserto, ke materialisma historia studo de Budaismo estas kontribuo al internacia kulturo de la flanko de proletaro en Oriento, kiun ni povas konsenti.

Nu, nia sinteno en nia studo pri Budaismo, precipe pri budaismaj sociaj fenomenoj, devas esti absolute tiu de sociologo kaj ne devas esti nur tiu de budaano. Ne, en iu okazo tio, ke ni estas

---

(12) *Ibidem*, p. XIII.

(13) *Ibidem*, p. 40

(14) *Ibidem*, p. 45

(15) *Ibidem*, p. 57

(16) Vidu A. Thalheimer: *Einfπhrung in die dialektischen Materialismus.*

budaanoj, ne nur ne estas necesa, sed ankaŭ malutila. Tamen havi profundan simpation budaanan, eĉ se estus pli aŭ malpli da danĝero en sciencista vidpunkto, pli multe helpos la komprenon. En ĉiu scienco, neniu ne supozus ian difinitan antaŭvidon aŭ utilecon. Eĉ ĉe Marksismo, kiu sin nomas Scienca Socialismo, troviĝus pli aŭ malpli nesciencecon, aŭ dogmecon, kiu devenis de la volo, ke la socio estu tia.

Ankaŭ Budaisma Sociologio povas havi du flankojn: teoria studo kaj aplika studo. Nome scienca studo kaj politika studo estas supozataj. En iu okazo, ekzemple kiel en nuna situacio, eble estas ŝajne pensata, ke budaismaj sociologoj urĝe devas studi en flanko praktika, ekzemple plibonigo de ekonomio de temploj aŭ refreŝigo de eklezioj ktp. Kaj "Sociala Budaismo" aŭ "Budaisma socialismo" ktp. estas facilanime asertataj. Sed se oni profunde konsideras, ni klare vidas, ke la tasko de sciencisto sintrovas en esplorado kaj eltrovo de la principo kaj leĝo, kaj praktika apliko de ĝia rezulto nur apartenas al la tasko de praktikuloj, kvankam ju pli progresas scienca studo, des pli vastiĝas ĝia aplika kampo. Sed ilia mallerta intermiksado ofte riskos danĝeron perdi du leporojn celante lin ambaŭ. Ĉi tiun punkton ni devas tre bone atenti.

# Ĉapitro IV . *La Fakoj de Budaisma Sociologio*

## 1. Klasifikoj laŭsekta kaj laŭafera

Jam koninte la pozicion de Budaisma Sociologio kiel speciala fako de religia sociologio laŭ klasifiko de ĝenerala sociologio, ni ĉi tie devas trakti klasifikon de Budaisma Sociologio.

Mi tuŝetis simple en jam menciitaj informoj "El Parizo" sur la ĵurnalo Ĉuugaj-nippo, laŭsektan klasifikon: Zen-sekta Sociologio, Ŝin-sekta Sociologio ktp. Kompreneble kiel en Kristana Sociologio sin trovas Katolika Sociologio, Protestanta Sociologio, estas farebla ankaŭ en Budaisma Sociologio klasifiko laŭ sektoj. Efektive ĝin oni devas klasifiki en du pligrandajn fakojn: en Mahajanan kaj Hinajanan Sociologiojn, ĉar Mahajana kaj Hinajana Budaismo havas grandan diferencon inter siaj konceptoj pri la mondo, socio kaj vivo. Ankaŭ en Hinda Budaismo sin trovas multaj sektoj, kiuj postulas distingon inter si laŭ sia koncepto pri regno, socio k.c. Ankaŭ inter Japanaj sektoj en ekononiaj fenomenoj la fakto ke en Niĉiren-sekto ĝermis *Fuĵufuse-ha* aŭ Nealmoza-subsekto, estas por ni interesega kaj ĝi instigas nian studemon.

Sed estas senbezone diri ke krom tia laŭsekta, nome Sekta Sociologio, pli inkluziva, ĝenerala fakaro de Budaisma Sociologio povas ekzisti.

Resume la sekta sociologio iuokaze estas valora kiel speciala studo, nur kiam ĝi estas farata en ĝenerala studprincipo, sed malfirma estas la bazo ke ĝi estas scienco kaj en rilato al sociologio la studo devas esti pli ĝenerala, sekve ni volas starigi sociologian studon komune budaisman.

Kaj do aŭfhebinte laŭsektan klasifikon de Budaisma Sociologio, oni devas preni originan klasifikon de ĝenerala sociologio. Nome devas esti traktataj sinteze fakoj de konceptoj pri familio, politiko, moralo, ekonomio, arto, kaj aliaj en Budaismo. Poste estos klarigataj la sociaj fenomenoj de Budaismo.

## 2. Problemoj en klasifiko laŭafera

Koncerne al studo de fakoj de Budaisma Sociologio farita sur tia sinteza vidpunkto, t.e. speciala traktado, nur ĉi sube mi prezentas la skemon de la studoplano.(17)

(1) *Budaismo kaj familia fenomeno*: ĉi tio estas studo de budaismaj fenomenoj en la fako de familia sociologio, kaj estas traktataj budaismaj ideoj kaj fenomenoj, ekzemple, seksa problemo, prostituo, edziĝi, virino, hejmo, bonziĝo ktp.

(2) *Budaismo kaj morala fenomeno*: ĉi tie oni klarigas moralan elementon de Budaismo, kaj studas ideojn kaj fenomenojn pri lojaleco al la reĝo aŭ mastro, dankemo, fila pieco ktp. kaj problemo de sinmortigo, kunsinmortigo de geamantoj ktp.

(3) *Budaismo kaj jura fenomeno*: ĉi tie estas studata ĉefe *Vinaja*, ordonoj abstinaj, kaj plie iliaj influoj de ĝi sur socion ekster eklezio, ekzemple la konstitucio de Princo Ŝootoku kaj leĝoj por eklezio aŭ por religio.

(4) *Budaismo kaj politika fenomeno*: ĉi tie estas studataj problemoj naskitaj pro kontakto de politika potenco kaj Budaismo, kaj koncernantaj al ŝtato, reĝo, regado, kaj ideala ŝtato kaj socio laŭ Budaismo, kaj sociboniga entrepreno de Budaismo ktp.

(5) *Budaismo kaj ekonomia fenomeno*: ĉi tio estas la plej fundamenta fako, kaj en kiu estas studata, kiamaniere budaisma ideo kaj eklezio estis difinita kaj ŝanĝita laŭ siatempa ekonomia bazo kaj medio, kaj inverse kian influon Budaismo donis al ekonomia stato, precipe almozado, templa financo, familia financo, konceptoj pri sociklaso, pri okupo, kaj financaj organoj kiel "*muzin*" kaj aliaj laboroj de budaisma eklezio sur financa ekonomio, ktp.

(6) *Budaismo kaj estetika fenomeno*: en Japanujo tre gravan signifon havis la kontakto inter Budaismo kaj belarto tiel ke oni povas aserti, ke nenio restas kiam oni elprenas el la japana artohistorio elementojn budaismajn. Ankaŭ en belliteraturo, muziko, forma arto kaj arkitekturo multe sin trovas

---

(17) Mi jam priskribis unu verkon, "Studo de Budaisma Sociologio," en japana lingvo (inoktavo p.328. junio 1935, Tokio.) Kaj tiuj ĉi ĉapitroj faras la unuan parton de la verko. Mi volas sincere aŭdi kritikojn kaj konsilojn de kolegoj.

budaisma influo kaj esprimo, ĉi tie estas provata sistema studo de tiaj fenomenoj.

(7) *Krome povas esti nomataj*: Budaismo kaj lingva fenomeno, scienca fenomeno (astronomio, matematiko, kuracarto, fiziologio, naturscienco ktp.) kaj eduka fenomeno ktp.

**(fino)**